



# Migranta Hirundo

26-a de novembro 2023, numero 6

Redaktas Dmitrij Ševčenko kaj Anna Striganova



## La solena fermo de la 4-a VK

Same kiel la malfermon, la fermon antaŭiris filmeto pri la Torina UK, kun tre bone kaptitaj kortuŝaj momentoj, kun multaj vizaĝoj, do bonvenis la nostalgio.

Fernando Maia, la gvidanto, komencis sian parolon de tio, ke iam dum malfacilaj tempoj la VK anstataŭis la UK-on, sed nun, jen, ili subtenas unu la alian. La varmaj karmemoraj ondoj de la reala UK alfluis al la bordo de nia nuna ferma ceremonio. Fernando dankis ĉiujn partoprenantojn ĉar tute sencelas la aranĝo sen siaj partoprenantoj. Aparte li fieris pri la Virtuala Movada Foiro (ViMF), kiu estis tiom riĉa kaj prezentis tiom da diversaj flankoj de nia movado.




Amri Wandel rakontis pri la scienca programo, kaj atentigis ke la prelegoj estas daŭre re-spekteblaj. Amri diris, ke multaj elektis aliajn programerojn, ĉar ili jam aŭskultis la prelegojn dum la UK, sed ja multaj homoj



plendis, ke ili timas viziti pro la tro alta scienca nivelo. Sed ili ne timu almenaŭ re-spekti, ĉar malgraŭ la alteco de la nivelo ĉiuj prelegoj estas kompreneblaj por nespartulo.

TEJO-n prezentis la estrarano Patricio Iglesias, kiu dankis la teamon de la VK kaj aparte la teknikistojn,



kaj invitis partopreni la IJK en Litovio, la unuan IJK en baltiaj landoj. Li atentigis, ke IJK ja estas renkontiĝo ne nur por junuloj, sed por junuloj... de ajna aĝo! Gravus ke la animo junu.

Sekvis la filmeto, invitanta en Aruŝon kun tiom da belegaj bestoj kaj tiom da varma suno, ke vortoj superfluas. Ankaŭ en Afrikon invitis Jérémie Sabiyumva, estrarano de UEA. Li ankaŭ petis ke oni zorgu pri la eblo viziti la kongreson por afrikanoj. La informon pri ebloj helpi serĉu en sekvaj numeroj de la *Migranta Hirundo*.



Peter Baláž memorigis, ke ĝis nun eblas registriĝi al la 4-a VK, kaj tio utilas, ĉar ĝis la 31-a de decembro estas spekteblaj ĉiuj registritaj prelegoj kaj kunvenoj, kaj ankaŭ ĝis la fino de la jaro funkcias babilejoj: kafejo, koridoro kaj drinkejo.



Verŝajne la plej brila momento de la fermo estis... invito aliĝi al UEA forme de kanto fare de Joel Muhire, kadre de kiu li sukcesis rakonti la historion de la aso-

cio, priskribi ĝian nuntempon kaj rakonti pri la utilo de aliĝo... dancante :) Antaŭ ol eksonis la himno, Fernando sukcesis diri ankoraŭ kelkajn vortojn, kiujn kronis la frazo "Ni zorgu unu pri la alia".



## Premio Grabowski 2023 aljuĝita dum la 4-a VK

La Premio Grabowski estis iniciatita en 1982 pere de la estigo de la Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG). Tio okazis danke al kontrakto de UEA kun la mecenato Adam Goralski (1912–2005), kiu dumvive helpis la administradon de FAG. La unua premiado okazis en 1984. La premio kaj la fondaĵo, portantaj la nomon de "la patro de la Esperanta poezio", Antoni Grabowski, celas subteni la Esperantan kulturon. La regularo por disdono de la premioj kaj subvencioj pere de FAG estis novformulita en 2017. La ĵurio de FAG, kiu aljuĝas premiojn averaĝe ĉiun duan aŭ trian jaron, nuntempe konsistas el Jesper Lykke Jacobsen, István Ertl kaj Mariana Evlogieva.

En la fermo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 26-an de novembro 2023, estis anoncita la ĉi-jara Premio Grabowski.

La unua (kaj sola) premio (800 usonaj dolaroj) iras al la eldona teamo de *Militrakonto*, nome Javier Alcalde (Hispanio), Pascal Dubourg Glatigny (Francio), Catherine Gousseff (Francio) kaj Ulrich Lins (Germanio). La kvar laŭreatoj ricevas la premion pro siaj elstaraj kontribuoj al la scienca studo de la historio kaj kulturo de la Esperanto-movado kun aparta enfokusigo de la tutmondaj konfliktoj en la 20-a jarcento, temo al kiu ĉiuj el ili kontribuis unuope kaj kune. Aparta kristaliĝo de tiu kolektiva agado estas ĝuste *Militrakonto*, kiu es-

tas ambicia esplorprojekto pri la transnacia imagaro de la dua mondmilito (en plej larĝa senco), vidata tra la optiko de Esperant-lingvaj fontoj. En tiu kadro estis iniciatita la retejo [mondmilito.hypotheses.org](https://mondmilito.hypotheses.org), kie regule aperas kontribuajtoj kaj novaĵoj de la internacia esplorgrupo, kiun gvidas la laŭreatoj.



UEA gratulas la premiitojn! La regularon de FAG interesatoj trovu ĉe [uea.org/teko/regularoj/regularo\\_fondajho\\_grabowski](https://uea.org/teko/regularoj/regularo_fondajho_grabowski). Por re-spekti la fermon de la 4-a VK oni aliru <https://vk.retevent.com/prelegoj/0wA3e-jUQxemyPF0wbfs>. Se oni ankoraŭ ne aliĝis al la 4-a VK, daŭre eblas tion fari, ĉar la registrita enhavo restos disponebla ĝis la 31-a de decembro 2023. Individuaj membroj de UEA en 2023, kiuj ankoraŭ ne aliĝis al la 4-a VK, povas daŭre aliĝi senpage. Kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas individuaj membroj de UEA, se tiuj aliĝas tra la VK, ili ĝuos ne nur la VK-n, sed ankaŭ duoblan aliĝon en UEA (por 2023 kaj 2024): <https://vk.esperanto.net/2023/aliĝilo>. Ĉiuj bonvenas diskonigi tion en siaj Esperanto-rondoj.

*El la Gazetaraj Komunikoj*






## Informa agado al lernejoj en Francio

★ Renée Triolle

Sabate, la 25-an de novembro, okazis en la Inĝeniera Altlernejo, Centrale en Marseille, kvizo. Esperanto-Marseille estis invitita kun kvar aliaj asocioj (SOS-Méditerranée, asocio pri klimato, seksa egaleco, civitaneco). Marc Gallardo konceptis la demandojn por la kvizo (pri la lingvoj en la mondo, pri la verkinto de Esperanto kaj kelkaj gramatikaj reguloj). Mi preparis materialon, pensante, ke ĉeestos studentoj-estontaj inĝenieroj, portis librojn, afiŝojn ... kaj evidentiĝis, ke temas pri 15-minuta interveno antaŭ lernejoj de mezgradaj lernejoj en la nordaj kvartaloj de Marseille. Vizitis nin 6 klasoj. Fakte la studentoj de Centrale enoficiĝas dum la lerneja jaro por helpi tiujn infanojn el malaltaj socitavoloj fari la hejmajn taskojn kaj malfermiĝi al kulturo. Kaj la kvizo, sekvita de kuka bufedo, estas ludo por ke ili atente aŭskultu, notu, memoru pri temoj rilataj al la ĝeneralaj temoj. Mi devis improvizi la intervenon, komencis per 2 frazoj en Esperanto (ĉu estas itala, portugala, hispana lingvo?) temas pri la “langue équitable”. Sekvis panoramo de la lingvoj en la mondo (prepara al la kvizo), prezento de la verboj (aktiva, kun helpo de Rosy Inaŭdi), de derivado kun koloraj “lego”j. Ŝajne la lernantoj interesiĝis, iuj tre bone respondis, reagis, faris demandojn (eĉ kie eblas aĉeti libron).

Sed pli interesa estas la kontakto kun la Asocio de studentoj kaj posta eblo interveni pli longe (du horojn) en la koncernaj klasoj iam dum la lerneja jaro.

Dankante pro la organizo mi donacis mian libron *Espéranto Express* al la studentino, kiu zorgis pri nia ateliero.



El la *dissendo-listo*: E-INS (*Esperanto-instruado*)  
[e-ins@googlegroups.com](mailto:e-ins@googlegroups.com)



## Akademia Konferenco/ Laŭro 2023

★ François Lo Jacomo,  
Sekretario de la Akademio

Trian fojon, la Akademio invitas vin al **Konferenco de la Akademio**, prelegserio okaze de la Zamenhof-festo. Kiel la unua (2021) kaj la dua (2022), ĝi okazos **la 14-an kaj 15-an de decembro, de la 14-a ĝis la 15:40 UTC**: naŭ akademianoj prezentos (per Zoom) prelegojn kaj pri la agado de la Akademio mem kaj pri la agado de akademianoj.

# Ade

**Jen la programo de tiu ĉi konferenco:**

**Ĵaŭdon, la 14-an de decembro, de la 14:00 UTC ĝis la 15:20 UTC:**

14:00: **Renato Corsetti**: Evolutendencoj de la vorttrezoro de Esperanto

14:20: **Anna Löwenstein**: La difinaro de *uea.facila*

14:40: **Aleksandro Shlafer**: Kio do vere igas Esperanton (mal)facila?

15:00: **François Lo Jacomo**: Ĉu komuna lingvo pacigos la homaron?

**Vendredon, la 15-an de decembro, de la 14:00 UTC ĝis la 15:20 UTC:**

14:00: **Barbara Pietrzak**: Jan Baudouin de Courtenay

14:20: **Tim Owen**: Preteratentitaj leteroj de Zamenhof

14:40: **Markos Kramer**: La duonvokalo ŭ en Esperanto

15:00: **Jesper Jacobsen**: La 10-a Oficiala Aldono al la Universala Vortaro

15:20: **Edmundo Grimley Evans**: Proklamo de la Laŭro de la Akademio

Aliĝu tra EventaServo:  
<https://eventaservo.org/e/5911d3>





## Eventaservo.org estis prezentita ĉe la VK

★ Anna Striganova

“Antaŭe ni estis antaŭe” – diras la frazo, de kiu komenciĝas miaj notoj pri la prelego. Jes, ĝia komenco estis pensiga. Yves Nevelsteen, la motoro de la projekto Eventa Servo, rakontis kiel ĉe la aŭroro de disvastigo de la reto ĝuste esperantistoj elpensis kaj kreis la Pasportan Servon, riĉe investis en disvolvado de Vikipedio, funkciigis la plej unuajn retvendejojn. Sed venis sekva epoko, en kiun ni ne sukcesis paŝi tiom sukcese.

“Se ni volas ke homo aliĝu, ni devas lerni vivi en mondo kie la tuta informo atingebblas dum 10 sekundoj”. Kaj, jes, tio estas vero. Ni jam al kutimiĝas ke ajnan informon ni povas eligi el nia saĝtelefono dum dek, spertuloj eĉ dum kvin sekundoj. Ni al kutimiĝis tigrade, ke ne trovinte informon tiamaniere kaj tiel rapide ni opinias tiun informon ne ekzistanta.



Kaj poste Yves montris, kiel ekzemplon, retpaĝojn de pluraj naciaj Esperanto-organizoj. Ĝuste ilin, ĉar ja plej verŝajne ĝuste ili estos trovitaj per novulo kiu serĉas, kie li renkontiĝu kun esperantistoj post kiam li finis tiun aŭ alian, plejverŝajne retan, Esperanto-kurson. Ĉiuj tiuj retpaĝoj estas belege kaj profesie faritaj, ili estas admirindaj, ĉar ili apartenas ĝuste al tiu epoko, kiam ni estis antaŭe. Do, kion vidas la vizitanto: “Nia klubo renkontiĝas ĉiusabate. Adreso. Dato. La jaro 2012.”

Certe mankas tiom da manoj por povi renovigi la informon, sed ja tia laboro postulas nek specialajn konojn nek eĉ bonan lingvoposedon... Sed la plej gravea estas, ke la teamo de Eventa Servo pretas helpi ne nur akumulante ĉiujn eventojn, sed ankaŭ integran te partojn de sia kalendaro en ajnan retpaĝon, dank'al

kiu la informo restos aktuala. Do ĝi invitas al senpaga kunlaboro, pretas helpi “por enmovadiĝo de retuloj”.

“Vere gravas ne ŝajniĝi, ke la lasta agado okazis en la jaro 2012”

Eventa Servo estas nun donacita al UEA por iĝi ĉies posedaĵo kaj ne malaperi, kiel foje malaperas gravaj projektoj kiam estingiĝas inspiro de iliaj kreintoj. Vi povas helpi al la projekto per la fonduso Instigo, ĉiu helpinto ricevos raporton.



## Diskuttrondo: Duolingemuloj

Okazos la 27-an de novembro post-VK-a programero.



duolingo

Ingyrd Oliveira, Patricio Iglesias kaj aliaj esperantistoj kaj aktivuloj de Duolingo havos diskuttrondon pri la kazo de la foriro de Duolingaj Esperanto-kursoj por parolantoj de la hispana, franca kaj la portugala. La babilĉambro okazos kadre de la VK, la 27-an de novembro, lundon, je 23:00 UTC. Ili estas de la grupo “Duolingemuloj” (Telegramo). Mediatorino: Ingyrd Oliveira. Daŭro: 55 minutoj.

Sekvu la informojn pri la evento ankaŭ en la EventaServo:

<https://eventaservo.org/e/VK4-Duolingemuloj>

Vi povas esti aŭtoro  
de *Migranta  
Hirundo*  
kaj la *Reta Revuo!*  
Por kontribui,  
skribu al la redakcio

[revuo.esperanto@gmail.com](mailto:revuo.esperanto@gmail.com)

